

Rusia Esperantista Unio

Materialoj
por la 32-a Konferenco de REU
Raportoj, protokoloj kaj aliaĵoj

Kazanĵ,
la 19-a – 20-a de aŭgusto 2023

Enhavtabelo

Provizora tagordo de la 32-a Konferenco de REU (19–20.08.2023).....	4
Raporto pri la agadperiodo aŭgusto 2021 – aŭgusto 2023.....	5
Eldona agado.....	5
Renkontiĝoj.....	5
Subteno de regionaj aranĝoj.....	5
Subteno de la laboro pri la vortaroj de Boris Kondratjev.....	5
Periodo 12.08.2021–19.12.2021.....	5
Periodo 20.12.2021–15.12.2022.....	5
Periodo 16.12.2022–29.07.2023.....	6
Statistiko pri la tuta tempo 12.08.2021–29.07.2023.....	6
Honortitoloj kaj gratifikoj.....	6
Esperantisto de la jaro.....	6
Eminenta Esperanto-instruisto de Rusio en la lernojaro.....	6
Konkurso de projektoj por Esperanto en Rusio.....	6
Kvereloj kun UEA.....	7
La antaŭhistorio.....	7
Demando de UEA pri konfirmo de neŭtraleco de REU.....	7
Ĉikanado kontraŭ Svetlana Smetanina.....	8
Protesta letero de REU.....	8
Paŭzo en pagoj al UEA.....	8
Financaj raportoj.....	9
Financa raporto pri la jaro 2021.....	9
Financa raporto pri la jaro 2022.....	11
Financa raporto pri la unua duonjaro de la jaro 2023 (ĝis 29.07.2023).....	13
Raporto pri dokumenta laboro.....	15
Dokumentoj, ricevitaj en la komenco.....	15
Danĝero de likvido de REU fare de Impostejo kiel nefunkcianta organizaĵo.....	15
Averto de Minjust pri manko de raportoj.....	16
Provoj ŝanĝi la juran adreson.....	16
Provo ekhavi bankan konton.....	17
Akiro de publikatoj de dokumentoj de REU.....	17
Akiro de publikatoj de dokumentoj de antaŭaj juraj personoj.....	17
Petskribo al UNESKO.....	18
Propono reen alinomi la kanzanjan straton Nazarbajev al Esperanto.....	18
Letero por klubo.....	19
Letero al Rosstat pri nekoincido en rezultoj de la censo.....	19
Provo prezenti al Impostejo impostan deklaron.....	19
Konsultoj ĉe juristoj.....	19
Lanĉo de preparado de nova Statuto.....	20
Об общем состоянии документов РосЭ и о новом уставе (по-русски).....	20
Характеристика документального оформления деятельности РосЭ.....	20
Краткий список проблем действующего Устава.....	21
Что будет, если не приводить устав в соответствие с действующим законодательством?	23
.....	23
Об избрании делегатов.....	23
Membrig-kampanjo.....	25
Delegitaro de la Konferenco.....	26
Заключение Контрольно-ревизионной комиссии (за период 2021–2023).....	28
Protokoloj de la Estraro (oficperiodo 2021–2023).....	31

Protokolo №1. Pri distribuo de la taskoj en la Estraro de REU por la sekva agadperiodo, konforme al la proponoj, sonigitaj dum la Konferenco.....	31
Protokolo №2. Pri respondo al letero de UEA de la 22-a aprilo 2022.....	31
Suplemento A. Letero de UEA.....	32
Suplemento B. Respondo de REU.....	32
Protokolo №3. Protesta letero de REU al UEA pri la kampanjo kontraŭ Svetlana Smetanina.....	33
Suplemento A. Protesta letero de REU al UEA pri la kampanjo kontraŭ Svetlana Smetanina	33
Protokolo №4. Pri nomumo de la Esperantisto de la jaro 2022 laŭ la versio de REU.....	34
Protokolo №5. Pri rezulto de la konkurso pri subteno de Esperanto-projektoj.....	34
Protokolo №6. Pri okazigo de la Rusiaj Esperanto-Tagoj — 2023.....	35
Protokolo №7. Pri kunvoko de la 32-a Konferenco de REU.....	35
Protokolo №8. Pri prokrasto de pago de la kotizoj de REU al UEA.....	36
Protokolo №9. Pri reprezentnormo kaj temaro de la 32-a Konferenco de REU.....	37
Protokolo №10. Pri proklamo de «Eminenta Esperanto-instruisto de Rusio en la lernojaroj 2022– 2023».....	37

Provizora tagordo de la 32-a Konferenco de REU (19–20.08.2023)

La unua tago

La unua kunveno (19.08.2023)

10:00–10:30	Ricevo de la mandatoj, testado de zoom-konekto, agordo de teknikaĵoj.
10:30–11:00	Malfermo de la Konferenco. Elekto de la organoj de la Konferenco: - kunvengvidanto; - protokolanto(j); - kalkulkomisiono. Kalkulo de la kvanto de delegitoj. Akcepto de la tagordo de la Konferenco.
11:00–11:45	Raporto de la Estraro pri la agado post la antaŭa Konferenco.
11:45–12:30	Raporto de la Kontrol-revizia komisiono
12:30–13:00	Pritakso de la laboro de la Estraro. Pritakso de la laboro de KRK.

Paŭzo por tagmanĝo

La dua kunveno (19.08.2023)

14:30–16:00	Raportoj de regionaj aktivuloj kaj kluboj
16:00–17:00	Interrilatoj de REU kun Esperanto-organizaĵoj en la mondo.
17:00–18:00	Eksteraj rilatoj.

La dua tago

La tria kunveno (20.08.2023)

10:00–10:30	Agordo de teknikaĵoj.
10:30–12:00	Pridiskuto/akcepto de la nova Statuto kaj alternativaj proponoj.
12:00–13:00	Konforma aktualigo de aliaj formalaĵoj, intercetere statuso de eksterlandaj membroj.

Paŭzo por tagmanĝo

La kvara kunveno (20.08.2023)

14:30–15:00	Proponoj por la posteno de la Prezidanto.
15:00–15:15	Elekto de la Prezidanto.
15:15–17:00	Agadprogramo kaj ideoj por la nova oficperiodo. Estontaj aranĝoj kaj projektoj. Proponoj por la konsisto de la nova Estraro.
17:00–17:20	Elekto de la Estraro.
17:20–17:40	Elekto de la Kontrol-revizia komisiono.
17:40–18:00	Diversaĵoj.

Raporto pri la agadperiodo aŭgusto 2021 – aŭgusto 2023

Somere 2021 estis espero pri reviviĝo de la movado en Rusio pro sentebla finiĝo de la pandemio. Tamen la sekvan jaron signis komenciĝo de la speciala milita operaco, kaj la movado devis kutimiĝi al novaj cirkonstancoj.

Planita por la 2022-a jaro granda internacia evento en Rusio — SAT-kongreso — estis nuligita, kaj, bedaŭrinde, REU ne sukcesis rapide orientiĝi kaj organizi anstataŭe iun landan aranĝon. Tamen, la vivo daŭris, kaj la Estraro klopodis daŭre plugi sulkon de la rutina laboro. Sube estas noticoj pri diversaj flankoj de ĝi.

Eldona agado

REU produktas revuon „Ponto“ kun la literatura suplemento „Cerbe kaj Kore“, dissendatajn al retroŝtoj de membroj. Pri redaktado de la revuo okupiĝas Nikolao Gudskov, kun helpo de Svetlana Smetanina.

Raporto de Nikolao Gudskov: «Post la lasta Konferenco estis publikigitaj 15 numeroj de la revuo „Ponto“ kun suma paĝa kvanto 174 kaj 12 numeroj de la literatura suplemento „Cerbe kaj Kore“ kun suma paĝa kvanro 174».

Raporto de Svetlana Smetanina: «Mi helpadis pri aperigo de Ponto kaj CkK, liveradis materialojn, provlegadis, korektadis. Lastan duonjaron okupiĝis pri organizo de RET.»

Renkontiĝoj

Dum la oficperiodo REU organizis nur unu renkontiĝon — RET-2023. Pri ĝi okupiĝis Svetlana Smetanina dum la unua duono de la 2023-a jaro.

Dum la 2022-a jaro ni, bedaŭrinde, ne sukcesis fari landan aranĝon anstataŭ nuligita SAT-kongreso.

Subteno de regionaj aranĝoj

Kiel dirite supre, en la 2022-a jaro REU ne faris iun aranĝon. Tiu somero restus tute sen Esperanto-aranĝoj, se ne okazus brilaj «Tempoj kaj urboj» en Jaroslavlo (TkU-2), organizitaj de Jelena Kuznecova.

Tiun aranĝon REU subvenciis per 5000 rubloj el la kaso.

Subteno de la laboro pri la vortaroj de Boris Kondratjev

Daŭre funkcias fonduso de REU «Subteno de laboro pri la vortaro de B. Kondratjev», kiu kolektas monoferojn de dezirantoj subteni la vortaron. Tradicie fine de la jaro ankaŭ el la kaso de REU ni donacas iom da mono.

Jen raportoj pri la fonduso.

Periodo 12.08.2021–19.12.2021

Dum la periodo 12.08.2021–19.12.2021 en la fonduson de REU «Subteno de laboro pri la vortaro de B. Kondratjev» venis 3340 ₺. La sola kontribuinto estas REU.

La mono estis transdonita al la Kondratjev-teamo la 19.12.2021.

Periodo 20.12.2021–15.12.2022

Dum la periodo 20.12.2021–15.12.2022 en la fonduson de REU «Subteno de laboro pri la vortaro de B. Kondratjev» venis 5500 ₺. Kontribuintoj:

14.01.2022 Vladimir Opletajev 750 ₺

14.12.2022 Aleksandr Lebedev 750 ₺

15.12.2022 REU 4000 ₺

La mono (5500) estis ĝirita al la Kondratjev-teamo la 15.12.2022.

Periodo 16.12.2022–29.07.2023

Dum la periodo 16.12.2022–29.07.2023 en la fonduson de REU «Subteno de laboro pri la vortaro de B. Kondratjev» venis 3000 ₺.

Kontribuintoj:

16.12.2022 Ikar Akimenko (Barnaulo) 750 ₺

19.12.2022 Nina Zujeva (Jelec) 1000 ₺

25.12.2022 Vladimir Opletajev (Surguto) 750 ₺

02.04.2023 Anatolo Masenko (Kislovodsk) 363,36 ₺

29.07.2023 Aleksandr Lebedev (Kovrov) 136,64 ₺

La kolektita mono (3000 ₺) estis ĝirita al la Kondratjev-teamo.

Statistiko pri la tuta tempo 12.08.2021–29.07.2023

Dum la tuta tempo ekde la Konferenco en Dagestano tra la fonduso trairis 11840 rubloj, el kiuj 7340 rublojn oferis REU, kaj 4500 rublojn oferis diversaj homoj.

Honortitoloj kaj gratifikoj

Esperantisto de la jaro

Ekde la jaro 2010 REU distingas elstaran agadon de aktivuloj de la landa esperantista movado per premio kaj honortitolo.

En la 2021-a jaro la Estraro ne aljuĝis la honortitolon.

En la 2022-a jaro la Estraro distingis per la honortitolo «Esperantisto de la jaro 2022 laŭ la versio de REU» samaran esperantistinon Jelena Kuznecova — pro la plej aktiva en la lando organizado de Esperanto-renkontiĝoj dum du lastaj jaroj kaj vigligo de Esperanto-vivo en Volgia regiono.

Krom la honortitolo, Jelena, kompreneble, ricevis ankaŭ materian gratifikon — 5 mil rublojn.

Eminenta Esperanto-instruisto de Rusio en la lernojaroj

En la 2018-a jaro REU lanĉis aljuĝon de la honortitolo «Eminenta rusia instruisto de Esperanto (de la lernojaroj...)».

Bedaŭrinde, la afero evidentiĝis ne ĉiujara, sed ĉiukelkjara: ekde tiu tempo ĝis la 2023-a estis proklamitaj nur du Eminentaj instruistoj.

Tamen, ĉi-jare la kurta listo kompletiĝis per ankoraŭ unu nomo. La Estraro proklamis Tatjana Loskutova «Eminenta Esperanto-instruisto de Rusio en la lernojaroj 2022–2023», konsiderante ŝiajn grandajn meritojn kaj atingojn en la instru-metodika laboro dum la pasinta lernojaroj, inkluzive:

- altnivelan organizadon kaj gvidadon de ampleksaj baza kaj mezgrada retaj kursoj de Esperanto por ruslingvanoj (la kursoj estis senpagaj por ĉiuj dezirantoj, fine de la studado la studentojn ekzamenis internacia komisiono),
- publikajn prelegojn pri Esperanto kaj pri Esperanto-agado, faritajn en la regionografia muzeo de la urbo Kohna,
- priesperantan televidintervjuon,
- strukturigon kaj aperigon en la Esperanto-Vikipedio de historiaj informoj pri Centro-Rusiaj Regionaj Esperanto-Renkontiĝoj, informoj pri la urbo Ivanovo kaj pri Esperanto en Ivanovo.

Krom la honortitolo, Tatjana ricevis ankaŭ materian gratifikon — 5 mil rublojn.

Konkurso de projektoj por Esperanto en Rusio

Fine de la 2022-a jaro laŭ iniciato de Aleksandr Lebedev estis lanĉita konkurso de granta subteno de projektoj por Esperanto en Rusio. La ideo estis okazigi monsubtenon al iu(j) projektoj, proponitaj de la membraro, aŭ sistemo de grantoj, kie grantodonanto estu REU kaj grantoricevanto — REU-membro(j) aŭ aliĝinta(j) kolektivo(j) de REU.

Limdato por sendi proponojn de projektoj por la konkurso estis indikita la 31-a de januaro.

Bedaŭrinde dum la indikita periodo ĝis la limdato venis nur unu adekvata propono — de Anatolo Sidorov pri eldono de broŝuro «Esperanto en Rusia gazetaro 1887–1917». Ankaŭ tiu propono estis iom problema tiusence, ke oni fakte proponis, ke la Estraro mem okupiĝu pri la eldono (kvankam la ideo estis, ke la Estraro donas monon, kaj pri efektivigo de la projekto okupiĝas la proponinto mem).

Tamen, ĉar iuj ajn aliaj proponoj mankis, la Estraro aljuĝis subtenon per 10 mil rubloj al tiu sola projekto pri eldono de la broŝuro. Aldone, ankaŭ la proponinto mem (Anatolo Sidorov) monofaris por la afero 10 milojn el propraj rimedoj, kaj la saman sumon aldonis Aleksandr Lebedev. Do sume por la eldono de la broŝuro ni havas 30 milojn.

La eldonon ni esperis fari jam printempe, sed koncernaj homoj en la Estraro plene dronis en preparado de RET kaj la Konferenco. Tute ne estis fortoj finfari la eldonon. Do, ni devas peti pardonon pro tio, ke la afero tiriĝas tiom longe.

Nun ni planas finfine efektivigi la eldonon de la broŝuro post RET, aŭtune.

Kvereloj kun UEA

La ĉefan parton de Estraraj decidoj dum la 2022-a jaro konsistigis leterinterŝanĝo kun UEA.

La antaŭhistorio

La 27-an de februaro 2022 en «Libera folio» aperis deklaro de 5 estintaj kaj aktualaj funkciuloj de REU kontraŭ la komenciĝinta kelkajn tagojn antaŭe Speciala milita operaco de Rusio en Ukrainio. La personoj (G. Arosev, A. Blinov, I. Gonĉarova, N. Gudskov, G. Kokolija) esprimis tie sian neŝaton al la agoj de nia lando kaj subskribiĝis kun indiko de siaj estintaj kaj aktualaj postenoj en REU.

La 6-an de marto Aleksandr Lebedev disvastigis mesaĝon kun la titolo «Distanciĝo de la antaŭnelonga deklaro de kelkaj personoj pri la eventoj en Ukrainio», kie atentigis, ke la pozicio de supre menciitaj personoj neniokaze estas pozicio de REU.

Samtempe li esprimis ankaŭ sian personan pozicion (subtenon de la Speciala operaco), subskribinte ankaŭ kun indiko de la posteno en REU, do tute simetrie al tio, kiel tion faris la menciita kvinopo.

La afero ŝajnis elĉerpita, tamen la 5-an de aprilo en «Libera folio» aperis artikolo de G. Arosev, en kiu li interalie prezentis tradukojn al Esperanto de ruslingvaj publikaĵoj en persona paĝo de Aleksandr Lebedev en VK, ĝenerale neniel ligitaj al Esperanto. La ruslingvaj publikaĵoj temis pri subteno de la milita operaco kaj disvolvite prezentis deziratajn por Rusio rezultojn, kiujn estus bone atingi per ĝi.

Demando de UEA pri konfirmo de neŭtraleco de REU

La 22-an de aprilo 2022 al la Estraro de REU venis letero de la Ĝenerala Sekretario de UEA Aleks Kadar.

Fakte UEA petis rekonfirmi, ke REU daŭre restas neŭtrala organizo. Tion la Estraro de REU senprobleme rekonfirmis, akceptite la 26-an de aprilo la decidon pri la teksto de la respondo. Post tio la respondo estis sendita al UEA.

En la respondo nome de la Estraro fakte estis ankoraŭfoje ripetita per iom aliaj vortoj la samo, kion pli frue jam skribis Aleksandr Lebedev en la mesaĝo pri «Distanciĝo de la antaŭnelonga deklaro de kelkaj personoj pri la eventoj en Ukrainio». Do, la respondo de REU tekstis:

1) Rusia Esperantista Unio estas oficiale registrita en Rusio socia organizaĵo. REU rekonfirmas, ke ĝi daŭre akceptas kaj respektas la Statuton kaj Ĝeneralan Regularon de UEA.

2) REU kiel organizaĵo estas neŭtrala rilate al politika situacio, ne aliĝas al deklaroj de privatuloj (inkluzive de sia prezidanto aŭ aliaj estraranoj), ĉu ili favoras aŭ kontraŭas la pozicion de la rusia registaro kaj agadon de rusia armeo, kaj ne respondecas pri tiuj kaj aliaj politike ŝarĝitaj opinioj.

3) Membroj de REU (inkluzive ĝian prezidanton kaj aliajn estraranojn), kiel privataj personoj estas plene liberaj havi kaj publike esprimi ajnan pozicion, kiom ajn grade neneŭtralan. REU estimas rajton de ĉiu persono agadi laŭ siaj konvinkoj kaj preferoj; ĝi estas organizaĵo vaste malfermita al homoj de diversaj opinioj pri politikaj kaj aliaj aferoj.

Ĉikanado kontraŭ Svetlana Smetanina

La 26-an de julio 2022 en Fejsbuko aperis komentoj en la nomo de Svetlana Smetanina (de ŝia fejsbuka konto) pri Esperanto-taga afiŝo de latvia esperantistino Margarita Zelve. La afiŝo de Zelve en kutima por okcidentanoj stilo ekspluatis temon de la ukrainiaj eventoj; la komentoj nome de Svetlana Smetanina tekstis «Domaĝe, ke UEA nur en la oka jaro de la milito en Donbaso rememoris pacon» kaj similstile defendis rusian vidpunkton je ukrainiaj eventoj.

Poste Svetlana Smetanina asertis, ke la komentojn en Fejsbuko lasis ne ŝi.

Malgraŭ tio, en komitata listo de UEA enhisteriis la finno O. Buller. Li postulis, ke UEA eksigu Svetlana de la posteno de ĉefdelegito de UEA en Rusio, kaj poste li ankaŭ ĉantaĝis UEA-estraron per sia malmembriĝo, okaze se UEA-estraro tion ne faros.

Protesta letero de REU

La 5-an de aŭgusto, reage al la aĉa kampanjo kontraŭ Svetlana Smetanina, Estraro de REU sendis al UEA protestan leteron. Tie ni atentigis, ke tiu kampanjo tute ne konvenas al la statuso de neŭtrala organizo (kiu devus esti UEA), kaj esprimis esperon, ke UEA ne iros vojon de politika engaĝiĝo.

La plenan tekston de la protesta letero vidu en «Protokoloj de la Estraro» (protokolo №3).

Paŭzo en pagoj al UEA

La UEA tamen dancis laŭ la fluto de O. Buller kaj eksigis Svetlana Smetanina de la posteno de ĉefdelegito por Rusio.

Pro tio en la Estaro de REU ekaŭdiĝis voĉoj pri malaliĝo de UEA.

Kiam en la 2023-a jaro venis tempo de vica pago de REU al UEA kiel aliĝinta asocio de UEA, la Estraro decidis prokrasti tiun pagon ĝis la Konferenco, kiu decidu pri la sorto de rilatoj inter REU kaj UEA (Protokolo №8. «Pri prokrasto de pago de la kotizoj de REU al UEA»).

Financaj raportoj

Financa raporto pri la jaro 2021

La raporto estis preparita de Aleksandr Lebedev la 19.02.2022.
Inkluzivas spezojn ekde 01.01.2021 ĝis 31.12.2021.

I. Ĝenerala kaso

Sumo en la kaso, restinta de la jaro 2020: 49 589,07 ₺

Enspezoj dum la jaro 2021

Titolo	Sumo, ₺
Invididuj kotizoj	8 000,00
Kotizoj de subtenantoj	3 000,00
Klubaj kotizoj	15 400,00
Repago de la ŝuldo de IKBE-kongreso	5 000,00
Librovendado, aŭkcio	1 550,00
Donacoj	100,00
Sume, ₺	33 050,00

Elspezoj dum la jaro 2021

Titolo	Sumo, ₺
Pripago de la domajno reu.ru	890,00
Kancelariaĵoj sume (pli detale vidu en la listo «Spezoj detale»)	2 296,00
Subvencio por la organizado de RET-2021 en Dagestano (la detalan raporton vidu en la listo «RET-2021»)	15 000,00
Pripago de Zoom por la 31-a Konferenco de REU	1 337,00
Donaco de REU por la fonduso de Kondratjev-vortaroj	3 340,00
Elpago de antaŭlonga ŝuldo al UEA 131 € (vidu parton III sube)	10 951,60
Sume, ₺	33 814,60

Restaĵo je la 31.12.2021: 48 824,47 ₺

II. Eŭroj ĉe Svetlana Smetanina

Restaĵo de la jaro 2020: 154,80 €

Elspezoj dum la jaro 2021

Pripago de REU-membreco en UEA por 2020	138,16 €
Kelkaj cendoj metitaj al la konto de REU ĉe UEA	0,84 €
Sume, ₺	139,00 €

Restaĵo je la 31.12.2021: 15,80 €

III. Konto de REU ĉe UEA (reua-p), eŭroj

**Restaĵo debeta (REU ŝuldas) de la 20.08.2018,
neniuj ŝanĝoj estis dum jaroj ekde tiu momento:** -131,48 €

Enspezoj dum la jaro 2021

Ĝiro el la ĝenerala kaso	131,00 €
Kelkaj cendoj el la Svetlana-eŭroj	0,84 €
Sume, ₺	131,84 €

Restaĵo je la 31.12.2021: 0,36 €

Pli detalan raporton eblas trovi en la paĝaro en la parto «Dokumentoj» aŭ elŝuti laŭ la rekta ligilo:
https://reu.ru/prenu/reu_financoj_2021_raporto.xlsx

Financa raporto pri la jaro 2022

La raporto estis preparita de Aleksandr Lebedev la 07.01.2023.
Inkluzivas spezojn ekde la 01.01.2022 ĝis la 31.12.2022.

I. Ĝenerala kaso

Sumo en la kaso, restinta de la jaro 2021: 48 824,47 ₺

Enspezoj dum la jaro 2022

Titolo	Sumo, ₺
Invididuj kotizoj	6 750,00
Kotizoj de subtenantoj	2 050,00
Klubaj kotizoj	15 000,00
Donacoj: 200 de Barnaula klubo + 250 de Jelena Uspenskaja + 617,94 de Jevgenij Bojĉin	1 067,94
Neidentigitaj pagoj: du-foje po 250 rub. Estas ies individuaj kotizoj, homoj ne mesaĝis informon pri si kaj ajnan kontakton.	500,00
Sume, ₺	25 367,94

Elspezoj dum la jaro 2022

Titolo	Sumo, ₺
23.06.2022: Konverto al 103,88 eŭroj (laŭ kurzo 94,49 rub/eŭro) kaj transmeto al la UEA-konto de REU por pripagi la aligitajn membrojn de REU.	9 815,63
Paĝaro reu.ru — jarpago por la domajno 890 rub. + jarpago por la https/SSL-sertifikato 1600 rub.	2 490,00
Subvencio por la aranĝo «Tempoj kaj Urboj» en Jaroslavlo	5 000,00
Donaco de REU por la fonduso de Kondratjev-vortaroj	4 000,00
Premio por Esperantisto de la jaro 2022	5 000,00
Elpago de la REU-konto de Jevgenij Bojĉin (li donacis la sumon al REU, do vidu ĝian revenon supre en «enspezoj»)	617,94
Kancelariaĵoj (notariaj kopioj de dokumentoj; presado de raportoj, petskriboj, leteroj; pagoj por ricevi dublikatojn de dokumentoj el la Impostejo; aĉeto de kovertoj).	5 670,00
Sume, ₺	32 593,57

Restaĵo je la 31.12.2022: 41 598,84 ₺

II. Eŭroj ĉe Svetlana Smetanina

Restaĵo de la jaro 2021: 15,80 €

Elspezoj dum la jaro 2022

Transmeto al la konto de REU ĉe UEA, 23.06.2022	15,80 €
Sume, ₺	15,80 €
Restaĵo je la 31.12.2022:	0,00 €

III. Konto de REU ĉe UEA (reua-p), eŭroj

Restaĵo de la jaro 2021: 0,36 €

Enspezoj dum la jaro 2022

Transmeto el la ĝenerala kaso (9815,63 ₺ → 103,88 €) kaj de Svetlana Smetanina 15,80 €, 23.06.2022	119,68 €
Subtenanta kotizo de eksterlandano A. Penk, 22.11.2022	25,00 €
Individua kotizo de eksterlandano I. Kossey, 22.11.2022	20,00 €
Sume, ₺	164,68 €

Elspezoj dum la jaro 2022

Pago de REU al UEA por aligitaj membroj (nejunaj), 30.06.2022	108,24 €
Pago de REU al UEA por aligitaj membroj (junaj), 30.06.2022	11,44 €
Sume, ₺	119,68 €

Restaĵo je la 31.12.2022: 45,36 €

Pli detalan raporton eblas trovi en la paĝaro en la parto «Dokumentoj» aŭ elŝuti laŭ la rekta ligilo:
https://reu.ru/prenu/reu_financoj_2022_raporto.xlsx

Financa raporto pri la unua duonjaro de la jaro 2023 (ĝis 29.07.2023)

La raporto estis preparita de Aleksandr Lebedev la 29.07.2023.
Inkluzivas spezojn ekde la 01.01.2023 ĝis la 29.07.2023.

I. Ĝenerala kaso

Sumo en la kaso, restinta de la jaro 2022: 41 598,84 ₺

Enspezoj dum la jaro 2022

Titolo	Sumo, ₺
Invididuj kotizoj	13 500,00
Kotizoj de subtenantoj	1 000,00
Klubaj kotizoj	12 000,00
Donacoj: 281,51 de Juriĵ Karcev + 109,57 de Eŭĝenij Delcov	391,08
Abono de revuoj de nemembro	250,00
Sume, ₺	27 141,08

Elspezoj dum la jaro 2022

Titolo	Sumo, ₺
Kancelariaĵoj (poŝtkovertoj, printado de diversaj paperoj, pago al impostejo por kopioj de dokumentoj)	2 235,00
Elpagoj de ŝuldoj al REU-kontoj de homoj (V. Ivanov, J. Karcev, A. Masenko, J. Delcov)	943,03
Por projekto de la eldono de la broŝuro de A. Sidorov	10 000,00
Premio al E-instruisto de la lernoĵaro 2022-2023	5 000,00
Sume, ₺	18 178,03

Restaĵo je la 29.07.2023: 50 561,89 ₺

II. Mono por efektiviĝi eldonon de la broŝuro de A. Sidorov

Subvencio de REU el la ĝenerala kaso	10 000,00
Kontribuo de A. Sidorov el propraj rimedoj	10 000,00
Kontribuo de A. Lebedev el propraj rimedoj	10 000,00
Sume, ₺	30 000,00 ₺

La eldono dume ne okazis pro superŝuto de la Estraro per la preparado al RET kaj Konferenco.
Espereble, aŭtune ni finfine faros tiun ĉi projekton.

III. Konto de REU ĉe UEA (reua-p), eŭroj

Restaĵo de la jaro 2022: 45,36 €

Enspezoj dum la jaro 2022

Subtenanta kotizo de eksterlandano A. Penk, 08.05.2023	30,00 €
Sume, ₺	30,00 €

Elspezoj dum la jaro 2022 mankas.

Restaĵo je la 29.07.2023: 75,36 €

Pli detalan raporton eblas trovi en la paĝaro en la parto «Dokumentoj» aŭ elŝuti laŭ la rekta ligilo:
https://reu.ru/prenu/reu_financoj_2023_unua_duonjaro_raporto.xlsx

La raporto pri la 2023-a jaro estis farita kaj liverita al la Kontrol-revizia komisiono 29-an de julio. Ĝi ne enhavas alvenintajn post tiu dato kotizojn kaj multajn elspezojn (por Konferenco, RET ktp) — ĉio tio estos normale kalkulita jam post RET.

Raporto pri dokumenta laboro

(Verkita de Aleksandr Lebedev la 24-an de marto 2023.)

Post la pasinta, 31-a, Konferenco de REU mi planis transpreni laboron pri dokumentoj (antaŭe faratan de Svetlana Smetanina) kaj, interalie, ekokupiĝi pri ekhavo de banka konto por REU. Ĉar dum la pasinta Konferenco estis levita demando pri oficiala banka konto, kiun REU ja ne havas, pro kio mono de la organizaĵo estas tenata en personaj bankaj kontoj de la kasisto.

Tiu ĉi raporto temas pri tio, kiel iris la laboro pri dokumentoj, kaj kiuj obstakloj riviĝis sur tiu vojo. Bankan konton REU ne ekhavis, sed ni eksciis ion novan kaj ekkonsciis pri kelkaj problemoj.

Dokumentoj, ricevitaj en la komenco

Septembre 2021 mi ricevis de Svetlana Smetanina la sigelon de REU kaj jenajn dokumentojn (ĉe ĉiu dokumento estas indikita ĝia dato):

- 16.01.1997 – registrita de Ministerio de justico (Minjust) Statuto de REU (akceptita de la Konferenco en Tjumenj la 8-an de oktobro 1995);
- 16.01.1997 – atestilo de Minjust pri la registriĝo de la socia unuiĝo;
- 25.09.1997 – atestilo de Impostejo pri INN (identiga numero de impostpaganto / идентификационный номер налогоплательщика, ИНН);
- 03.04.2000 – ankoraŭ unu (pli nova) atestilo de Impostejo pri INN;
- 06.12.2000 – informa letero de GosKomStat (Ŝtata komitato pri statistiko) pri statistikaj kodoj de REU;
- 21.02.2003 – atestilo pri enmeto de informo pri REU en JEGRJUL (Unueca ŝtata registro de juraj personoj / Единый государственный реестр юридических лиц, ЕГРЮЛ);
- 25.11.2009 – eltiraĵo el JEGRJUL laŭ la stato je 25.11.2009.

Oficiale en JEGRJUL ekde multaj jaroj kiel prezidanto de REU estas indikita Nikolao Gudskov, kaj elektante novajn prezidantojn dum multaj jaroj oni ne faris oficialan ŝanĝon.

Ankaŭ ĉi-foje la dekomenca plano estis dume nenion ŝanĝi, sed ĉe neceso interagi kun iuj instancoj, uzante ricevitaĵojn de Nikolao konfidpaperojn.

Danĝero de likvido de REU fare de Impostejo kiel nefunkcia organizaĵo

Septembre 2021, rigardante informon, kiu troviĝas en JEGRJUL pri REU, mi rimarkis indikon, ke la organizaĵo troviĝas en la stato de likvidado kiel nefunkcia.

Mi esploris, kiel tio povis okazi, kaj trovis, ke Impostejo povis meminciate komenci proceduron de likvido, se mankas vivsignoj de la organizaĵo – ne estas monmoviĝo en banka konto kaj ne estas raportoj. (Jen plia kaŭzo ekhavi normalan oficialan bankan konton nome de organizaĵo, sed ne umi pri mono «neoficiale», tenante ĝin en persona konto.)

Intercetere, kiel rememoras la malnovaj estraranoj, la situacio ne estas nova — REU surpaŝas la saman rastilon ne la unuan fojon. Simila starto de likvidproceduro pro manko de vivsignoj de la organizaĵo iam jam okazis.

Feliĉe, ke en tiaj okazoj Impostejo ĉesas la likvidproceduron, se ĝustatempe ricevas proteston pri tio de iu ajn interesita persono, eĉ ne nepre estrarano.

La 14-an de septembro 2021 mi transdonis al Impostejo protestan leteron de REU (verkis ĝin Svetlana).

Post tio Impostejo ĉesis la proceduron de likvidado.

Averto de Minjust pri manko de raportoj

Simila problemo pri manko de vivsignoj de REU riviĝis en Ministerio de justico.

Novembre 2021 al la adreso de Nikolao (kiel oficiala prezidanto laŭ JEGRJUL) venis letero de Minjust. La letero estis sendita la 26-an de oktobro 2021. En la letero troviĝis averto, ke REU jam dum du jaroj ne prezentis raportojn al Minjust. Do, estis postulo prezenti raportojn. Krome, en la letero estis skribite, ke komence Minjust sendis tian leteron al la jura adreso de REU, indikita en JEGRJUL – tio estas adreso de la iama instituto MASI ĉe Avtozavodskaja. REU jam antaŭlonge ne havas tie sidejon. De tie la letero revenis al Minjust kiel «nericevita de la adresato», kaj nur post tio Minjust resendis la leteron al la adreso de Nikolao. Rilate la adreson en la letero estis speciala atentigo, ke organizaĵo devas havi aktualan adreson en JEGRJUL, aliokaze ĝi riskas preterlasi iujn leterojn.

Mi urĝe preparis raportojn por Minjust por ambaŭ jaroj: a) pri daŭrigo de la funkciado de la organizaĵo kaj b) pri nericevo de rimedoj el eksterlando.

Kune kun la raportoj mi preparis informleteron, kie REU informas, ke la misoj estas korektitaj (raportoj prezentitaj), kaj ke ni okupiĝos pri ŝanĝo de la adreso en JEGRJUL al la aktuala. Kiel aktualan adreson de la organizaĵo ni planis uzi la hejmadreson de Nikolao.

Ĉiujn paperojn (la raportojn kaj la informleteron) mi liveris al Minjust. De la instanco poste venis respondo, ke ĝi kontentas.

Provoj ŝanĝi la juran adreson

Mi esploris la proceduron pri ŝanĝo de la jura adreso. Normale por tio (same kiel por aliaj ŝanĝoj en JEGRJUL) organizaĵo devas fari petskribon laŭ formularo №P13014, subskribita de la subskriborajta persono (niaokaze, do, Nikolao) en ĉeesto kaj kun konfirmo de notario. Nikolao telefonis al notario kaj eksciis, ke en notariejo oni volos vidi dokumentojn de la organizaĵo – la Statuton kaj la protokolon, per kiu estis elektita la subskriborajta persono. La Statuton ni havis, sed la protokolo pri elekto de Nikolao mankis (vidu supre liston de «dokumentoj, ricevitaj en la komenco»).

Plia serĉado ĉe Nikolao kaj ĉe Svetlana ne donis rezulton – la protokolo perdiĝis, kaj ni ne povis pruvi al notario la rajtojn de Nikolao.

Krome, dum pliaj esploroj pri la proceduro, mi trovis informon, ke Minjust kutime postulas por ŝanĝo de la jura adreso ankaŭ decidon de la supera organo, se la Statuto ne transdonas eksplicite la rajton tion fari al la Estraro aŭ al la Prezidanto. Kaj nia Statuto ja silentas pri tio.

Do, pro tiuj du obstakloj la ŝanĝo de la adreso laŭ normala proceduro estis por ni blokita.

Tamen, esplorinte la historion de la adreso de REU en JEGRJUL, ni trovis interesajn faktojn. Kiam en la 2003-a jaro la informo pri REU estis aldonita al JEGRJUL, la adreso de la organizaĵo estis tiu hejmadreso de Nikolao. Poste, la 24-an de aprilo 2018, la adreso en JEGRJUL subite ŝanĝiĝis al tiu ĉe Avtozavodskaja. Aspektis tiel, ke Impostejo, kiu zorgas pri JEGRJUL, meminciate faris tiun ŝanĝon.

Surbaze de tio mi provis ruzan vojon – sendis petskribon, eni kiu argumentis, ke komence la adreso estis ĝusta, kaj poste oni erare ŝanĝis, do bonvolu ŝanĝi reen. Petskriboj pri korekto de eraroj ne postulas iun protokolon pri decido, nek notarian konfirmon, do estis eta espero, ke oni konsentos korekti la adreson de REU sen tiuj burokrataĵoj.

Komence tia letero pri «korekto de eraro» estis sendita al Minjust. Ĝi respondis, ke en la dosierujo pri REU, kiun ĝi havas, vere estas informo, ke la adreso estas tiu de Nikolao, kaj neniu Avtozavodskaja. Tamen, pri JEGRJUL zorgas Impostejo, kaj ni petskribu tien – respondis al ni Minjust.

Do, la sama letero estis direktita al Impostejo.

Impostejo ne agnoskis tiun okazintan la 24-an de aprilo 2018 ŝanĝon «eraro». Ĝi respondis, ke tiu ŝanĝo estis farita reage al iu ricevita de REU tiam peto kaj surbaze de paperaj dokumentoj, en kiuj ie troviĝis mencio pri Avtozavodskaja. Pri kiu peto fare de REU en la aprilo 2018 temas — mi ne sukcesis kompreni. En la Estraro neniu memoras, kaj Impostejo detalojn de estinta korespondado ne malkovaras.

Tiel provoj ŝanĝi la juran adreson al la aktuala sen fari plenskalan burokratan proceduron fare de Konferenco fiaskis.

Aldone ni eksciis, ke ni ne havas gravan paperon – protokolon pri elekto de Nilolao.

Provo ekhavi bankan konton

Aprile 2022 ni kun Nikolao vizitis Ŝparbankon por provi malfermi bankan konton por REU. Evidentiĝis, ke banko postulas samajn paperojn kiel notario, inkluzive protokolon pri elekto de la indikita en JEGRJUL prezidanto. Aldone banko volis vidi ankaŭ protokolon pri akcepto de la aktuala Statuto. Ambaŭ ni ne havis, do la provo ekhavi bankan konton fiaskis.

Akiro de dublikatoj de dokumentoj de REU

Mi supozis, ke protokoloj kaj eble iuj aliaj dokumentoj devas esti en Minjust kaj en Impostejo. Kaj ekde majo 2022 mi klopodis ricevi de la instancoj la dublikatojn.

La 6-an de majo 2022 mi direktis al Minjust kaj al Impostejo similajn petskribojn – ke ili donu al ni listojn de dokumentoj, kiujn ili havas pri REU.

Minjust respondis, ke ĝi tion donos nur laŭ peto de juĝejo okaze de iu juĝproceso.

Impostejo facile donis liston de dokumentoj, kiuj troviĝas la registra dosierujo pri REU. Ricevinte tiun liston, mi direktis al Impostejo novan petskribon, kie petis jam doni dublikatojn de ĉiuj dokumentoj laŭ la listo. La servo estas pagata, do mi pagis por tio el la kaso de REU.

Tiamaniere estis sukcese ricevitaĵ la jenaj dokumentoj (binditaj kaj kun stampo «Kopio estas ĝusta»):

- 16.01.1997 – Ordon de Minjust №19-47-2-97;
- 08.01.1997 – Petskribo pri ŝtata registro de la jura persono;
- 06.10.1995 – Protokolo de la Konferenco en Tjumenj;
- 01.02.1997 – Konsisto de la Estraro.

(Kaj pluse dublikato de la Statuto — ne vere bezonata, ĉar ni ja havas la originalon).

La protokolo de la Tjumena Konferenco enhavas informon pri akcepto de la Statuto. Do estas unu el dokumentoj, kiun petis la banko, kiam ni vizitis tiun por provi malfermi konton.

Sed tiam en Tjumenj kiel prezidanto de REU estis elektita A. Korĵenkov.

En pli posta papero «Konsisto de la Estraro» (01.02.1997) kiel prezidanto jam estas indikita A. Junusov.

Kaj nenie estas ajna mencio pri elekto kiel prezidanto de Nikolao Gudskov, kiu nun estas indikita en JEGRJUL.

Do, iuj dokumentoj estis akiritaj, sed ne ĉiuj necesaj.

Akiro de dublikatoj de dokumentoj de antaŭaj juraj personoj

Foje, trarigardante liston de esperantistaj organizaĵoj en JEGRJUL, mi trovis ion interesan.

En JEGRJUL, se serĉi per la vorto «эсперантистов», troveblas deko da Esperanto-organizaĵoj, ĉiuj krom nia nuna REU estas likviditaj.

Inter tiuj likviditaj organizaĵoj, subite, oni trovas:

a) SEU kun adreso ĉe Volĥonka 13, ĝi estis registrita, laŭ informo de JEGRJUL, en 1991 kaj likvidita per juĝdecido en 2006,

b) Alia REU kun indikita kiel ĉefo Andreo Ananjin (Grigorjevskij), registrita en 1993, likvidita kiel nefunkcia organizaĵo en 2009.

Pri tiuj du likviditaj organizaĵoj mi penis ricevi dokumentojn el Impostejo, same kiel pri la nun funkcia REU.

Pri SEU tio plene sukcesis — la Impostejo donis liston de la dokumentoj kaj poste mem la dokumentojn laŭ la listo. Tio estas:

- 21.12.1990 - Protokolo de plenkunsidoj de la 9-a Kongreso de SEU;
- 30.04.1991 - Statuto de SEU, registrita de Minjust de USSR;
- 30.06.2005 - Decido de juĝejo pri likvido de SEU;
- 05.09.2005 - Ordon de Federacia regisra servo pri eligo de SEU el JEGRJUL.

La protokolo de la 9-a Kongreso de SEU estis interesa legaĵo, multaj konataj personoj estas menciitaj tie.

El la decido de juĝejo sekvas, ke ĝis la 2005-a jaro SEU «pendis» kiel iu fantomo. En la 2005-a jaro instancoj komencis proceduron de likvido kiel nefunkcia organizaĵo. Al la oficiala adreso (evidente, al tiu domo ĉe Volĥonka 13, kie jam antaŭlonge situas bildgalerio de Glazunov) oni sendis averton, kompreneble ricevis neniun respondon, kaj per juĝdecido likvidis la juran personon.

Pri la malnova REU (registrita en la 1993-a jaro) mi ne sukcesis ricevi dokumentojn. Impostejo respondis, ke ĝi ilin ne havas. La antaŭa ŝtata strukturo, kiu okupiĝis pri registrado de juraj personoj, kaj kiu registris tiun malnovan REU – Moskva registra ĉambro – antaŭlonge ne plu ekzistas. Ĝia arĥivo teorie devis esti ien transdonita. Mi sendis leteron al Moskva registaro kun demando – kie estas tiu arĥivo. Ili plusendis la demandleteron al Moskva ĉefa arĥivo. Tiu respondis, ke ili trarigardis tion, kion ili havas de Moskva registra ĉambro, sed dokumentojn pri la malnova REU ili en tio ne trovis.

Petskribo al UNESKO

La 29-an de septembro 2021 REU sendis al Rusia Komisiono pri UNESKO-aferoj grandan leteron kun peto subteni proklamon de la 26-a de julio Internacia Tago de Esperanto. Tio estis ago enkadre de internacia kampanjo, ankaŭ en aliaj landoj esperantistaj organizaĵoj sendadis similajn leterojn al siaj UNESKO-Komisionoj. La letero estis preparita surbaze de specimeno, kiun liveris al ni la organizantoj de la kampanjo. Nikolao Gudskov tradukis tiun specimenon el Esperanto al la rusa, Andrej Peĉonkin redaktis, Svetlana Smetanina kunordigis la aferon.

La Komisiono respondis al ni, ke ĝi ĉi-etape ne pretas iniciati proklamon de la Tago ene de UNESKO. La komisiono argumentis, ke Esperanto ne havas oficialan statuson en Rusio, kaj la nombro de la parolantoj estas nur ĉirkaŭ mil homoj.

Propono reen alinomi la kazanjan straton Nazarbajev al Esperanto

Komence de la 2022-a jaro en Kazahio okazis amasaj malordoj, rezulte de kiuj la aŭtoritata grupo de la antaŭa prezidanto Nazarbajev estis forigita el la potenco. La kazahia ĉefurbo Nur-Sultan (antaŭnelonge nomita tiel dediĉe al Nazarbajev) estis denove nomita Astana.

Rilate al tio, la 25-an de februaro 2022 REU sendis al la urbeŝtaro de la rusia urbo Kazan leteron pri la strato Esperanto. Tiu kazanja strato antaŭe, en la 2015-a jaro, estis alinomita al Nazarbajev.

Nun REU proponis revenigi la antaŭan nomon Esperanto al la strato. La leteron preparis Svetlana Smetanina, kiu ankaŭ en la 2015-a jaro batalis por tiu Esperanto-strato.

Post monato, la 23-an de marto, venis respondo de la ĉefo de la Komisiono pri toponimio de Kazanj. La respondo estis «otpiska». Ĝi listigis burokratajn malfacilaĵojn kaj kostojn de alinomo de la strato kaj pro ĉio tio konstatis, ke la alinomo ne eblas. Kvankam en la 2015-a jaro ĉio sama ne malhelpis al la potenculoj ŝanĝi la nomon de la strato de Esperanto al Nazarbajev.

Letero por klubo

La 3-an de julio 2022 al Samara Esperanto-klubo estis liverita papero por konfirmi, ke ĝi estas funkcia klubo kaj grava Esperanto-centro en Samara regiono. La klubo bezonis tion por ekhavi klubojn.

Letero al Rosstat pri nekoincido en rezultoj de la censo

Komence de la 2023-a jaro, rigardinte rezultojn de la popolnombrado-2020, mi trovis tie nekoincidojn inter sumoj de Esperanto-parolantoj laŭ regionoj kaj la sumoj, indikitaj por la tuta Rusio.

Nome de REU al Rosstat estis sendita letero kun peto klarigi tiujn nekoincidojn.

Rosstat respondis, ke la nekoincidoj aperis pro teknika eraro dum enŝutado de la rezultoj en la paĝaron. Kaj ke nun oni jam faris korekton kaj enŝutis ĝustajn rezultojn.

Post tio mi rekontrolis la renovigitajn rezultojn kaj trovis, ke jes, nun la sumoj koincidas.

Provo prezenti al Impostejo impostan deklaron

La 20-an de aprilo 2022 mi provis prezenti al Impostejo «nulan» impostan deklaron pri tio, ke REU ne havis iun komerce perlaboritan monon kaj do ankaŭ impostoj mankas.

Oficisto en impostejo trovis kelkajn korekteblajn erarojn en la deklaro kaj unu nekorekteblan – tie necesis indiki tiel nomatan kodon OKVED (Tutrusia klasifiklibro de specoj de ekonomia agado / Общероссийский классификатор видов экономической деятельности, ОКВЭД). Teorie OKVED-kodojn nuntempe devas havi ĉiuj juraj personoj. Tamen REU ne havas.

La kodoj OKVED ĉe juraj personoj estas indikitaj en JEGRJUL. Por REU ĝi ne estas indikita, ĉar, kiam oni registris REU-n, tiuj OKVED-kodoj ankoraŭ ne ekzistis.

Por enmeti tiun kodon en JEGRJUL, bezonatas decido de la Konferenco, kaj tion necesas registri en Minjust, same kiel ŝanĝon de la jura adreso.

Konsultoj ĉe juristoj

Decembre de la 2022-a jaro mi konsultis juriston pri tio, kiel ordigi niajn jurajn aferojn.

Ĝenerala rekomendo estis tute atendita: akcepti ĉion necesan (ŝanĝi la juran adreson, aldoni la OKVED-kodon, elekti prezidanton) pere de Konferenco, registri ŝanĝojn ĉe Minjust, kaj nur post tio moviĝi antaŭen.

Krome, li atentigis min, ke necesas ankaŭ zorgi pri tio, ke ni havu en la rusa lingvo internajn dokumentojn, antaŭviditajn de la Statuto, por eventuale montri, se en estonteco iu revizoro petos. Pro tio ekde februaro de la 2023-a jaro mi komencis, krom protokoloj de la Estraro en Esperanto, fari ankaŭ versiojn de ili en la rusa lingvo. Simple por ke tiuj paperoj estu por iu okazo.

Estis rekomendo ankaŭ pripensi aktualigon de nia Statuto. La nunan Statuton oni akceptis en la 1995-a jaro, kaj la Statuto multe malnoviĝis kaj ne konformas al la nuna leĝaro. En la 2015-a jaro, post la Konferenco en Ĉuvaŝio, estis provo aktualigi la Statuton. Tion provis Svetlana. Sed tiam la proceduro de registriĝo de la nova Statuto ne estis farita ĝis fino. La ŝanĝo ne okazis. Nun daŭre

funkcias la tjumena Statuto de la 1995-a jaro. Kaj pasis preskaŭ dek jaroj de tiu provo. Nun fari tiun laboron necesas dekomence.

Jam en la nuna, 2023-a jaro mi konsultis juristojn pri la Statuto kaj pri vico da demandoj, ligitaj kun oficiala okazigo de Konferenco laŭ leĝaj postuloj. Pri la Statuto la ĝenerala impreso de juristo estas – tiom malnova, ke necesas reverki preskaŭ plene laŭ aktualaj postuloj de leĝoj kaj Minjusto.

Lanĉo de preparado de nova Statuto

Konsiderante ĉion supre diritan, la 21-an de marto estis lanĉitaj preparlaboroj por akcepto de nova Statuto de REU (Estrara protokolo №7 pri kunvoko de la 32-a Konferenco de REU de 21.03.2023).

Об общем состоянии документов РоСЭ и о новом уставе (по-русски)

Характеристика документального оформления деятельности РоСЭ

Начиная работу в должности президента РоСЭ несколько лет назад, я не имел представления о том, как должна документально оформляться деятельность нормальной НКО, и вначале продолжал практики, сложившиеся в нашей организации в предыдущие годы при предыдущих руководителях. Эти практики кратко можно перечислить так:

- Протоколы решений руководящих органов РоСЭ пишутся неформально на эсперанто, на русском языке не пишутся и в виде официальных документов не оформляются. Это относится как к протоколам Правления, так и к протоколам Конференций.
- Приём/исключение членов проводятся автоматически по факту уплаты/неуплаты членского взноса и не оформляются никакими решениями.
- Банковский счёт организации отсутствует, деньги собираются и расходуются через личные банковские карточки.
- Бюджет не составляется.
- Общее отношение давних членов правления ко взаимодействию с госорганами и банками — параноидальное «как бы чего не вышло» — чем меньше взаимодействий, тем лучше.
- Как логичное продолжение предыдущего пункта — с начала 2000-х годов решения конференций не регистрируются в Министерстве юстиции, официальная смена руководящих органов не проводится.
- Сами конференции проводятся некорректно: без надлежащего избрания делегатов и с предоставлением права голоса каждому мимо проходящему члену РоСЭ, изъявившему желание поучаствовать. То есть, фактически не являются конференциями (конференция — это выборный представительный орган).

Таким образом, документально не оформляется практически ничего. В результате мы имеем следующую ситуацию с документами. Речь об официальных документах на русском языке, которые должны быть у организации и, в частности, запрашиваются государственными органами в случае проверок:

- решения органов управления (протоколы, распоряжения, приказы) — отсутствуют;

- юридический адрес неактуален, документы на юридический адрес — отсутствуют;
- документы, подтверждающие полномочия органов управления (для Конференций это протоколы избрания делегатов, для Правления и Президента это протоколы Конференций) — отсутствуют;
- финансовые планы, бюджет — отсутствует;
- перечень членов ведётся в электронном виде, но официальные решения о приёме/исключении членов — отсутствуют;
- отчеты руководящих органов о проделанной работе — есть только на эсперанто, на русском языке отсутствуют;
- бухгалтерская и налоговая отчётность — отсутствует, при этом даже при желании предоставить её невозможно, так как у организации нет ОКВЭД-а (кода экономической деятельности);
- Устав РоСЭ, принятый в 1995 году, безнадежно устарел — требует приведения в соответствие с законодательством;
- Внутренние положения (о членстве, «Ĝenerala regularo» и другие) существуют по большей части на эсперанто, на русском языке официально не принимались.

